

THE BOOK OF GUESTS IN ESPERANTO

by Clarence Bicknell

Transcription of Esperanto original and English translation.

Clarence wrote in this small vellum-bound album his notes in Esperanto on guests who had spent the night in the Casa Fontanalba, including four dogs. Each left-hand page shows notes on a guest in coloured ink with their initials illuminated; the right-hand page shows a watercolour of a flower found nearby, sometimes relevant to the person.

The book is full to the last page, so much so that to enter subsequent visitors Clarence went back in the album and used empty space on many pages; this can first be seen on page 5 where the 1906 entry for Mercede Pollini is followed by the 1915 entry for Joseph Benbow. If there is not enough room on the page for the second person then Clarence is not averse to continuing on the next page with space, e.g. Jules van Biesbroeck on page 9, continued on page 10. On page 34 is an example of an entry by someone other than Clarence - dated 17 July 1918, the day Clarence died there - for a cowherd on his way up to his pasturage; the entry is probably by Luigi's wife Mercede Pollini whom Clarence described as a good Esperantist. There are similar entries on pages 35 and 36.

The vellum-bound books, (about a dozen of them, of which seven are in the Fitzwilliam Museum in Cambridge), when new, are said to have been gifts to Clarence from Margaret Berry to whom he returned them when they were full. This *Book of Guests in Esperanto* is the only small format one recorded by the Clarence Bicknell Association. The album's title differentiates this book from the *Casa Fontanalba Visitors' Book* which contains only the signature of visitors.

Book of Guests in Esperanto.

- Vellum-bound album of cartridge papers, about 40 pages, half full.
- The empty album made by Giuseppe Giannini, via Tornabuoni, Firenze and retailin for 2.50 lira.
- 130x205mm portrait.
- Completed by Clarence between 1910 and 1915.
- Transcribed in Esperanto by Michela Lipari [Italian Esperanto Association] in January 2019
- Translated into English by Professor Humphrey Tonkin (Emeritus Professor of the Humanities, University of Hartford, USA) in February 2019 and updated by Graham Avery August 2021.
- Compiled, checked and formatted into this document by Marcus Bicknell 2021.

The four-digit photo numbers are those of the set taken by Marcus in 2011 and used as reference by Michela Lipari when translating.

marcus@bicknell.com

www.clarencebicknell.com

filename Book of Guests in Esperanto with English translation.docx

<https://clarencebicknell.com/the-book-of-guests-in-esperanto-text-published/>

29 June 2021 updated 20 August 2021 MB GA

Original words by Clarence Bicknell in Esperanto	Translation into English
<p>1 Frontispiece. Photo file No. 1439 Mallongaj biografioj aŭ notoj pri la geamikoj aŭ aliaj personoj kiuj dormis en tiu-ĉi dometo de 1906 ĝis [1915], kaj kies komencaj nomliteroj estas pentritaj sur la muroj de la manĝoĉambro</p>	<p>1 Short biographies or notes on the friends and other people who have slept in this cottage from 1906 to [1915] , and whose beginning initials are painted on the walls of the dining room</p>
<p>2 1906 MAHDI, mia fidela hundo, estis la unua amiko kiu dormis en mia dometo en Val Casterino. Li estis tre batalema kaj havis multe da amikoj ĉu homaj ĉu hundoj en Bordighera, sed en la domo li estis tre bona kaj amema. Neniam hundo laboris pli forte por sia ĉiutaga pano, ĉar li ĉiam alportis hejmen lariksbranĉojn por la fajro, aŭ aliajn utilaĵojn. Li mortis en 1907. Liaj estoj kuŝas en paco sub bela tombŝtoneto, kaj lia spirito ĝuas eternan vivadon kun la spiritoj de ĉiuj estaĵoj en la mondo kiun [sic] Morto ne tuŝas.</p>	<p>2 1906 MAHDI, my faithful dog, was the first friend that slept in my cottage in Val Casterino. He was very aggressive and had a lot of enemies, both human and canine, in Bordighera, but in the House he was very good and loving. Never a dog worked harder for his daily bread because he always brought home larch sticks for the fire or other useful objects. He died in 1907. His remains lie in peace under a beautiful tombstone, and his spirit enjoys eternal life with the spirit of all things in the world that Death does not touch.</p>
<p>3 Photo file No. 1440 1906 Clarence Bicknell konstruigis la dometon, ĉasa Fontanalba, sur la lando de Grafo Alberti della Briga, ĉar li ne povis trovi loĝejon en la valo kaj por ke li povu daŭrigi siajn studojn pri la prahistoriaj gravuraĵoj en la najbara Valo Fontanalba kaj ĉe la Lagoj de la Mirindaĵoj. La dometo estis finita en 1905, kaj en Junio 1906 li unue loĝis en ĝi. Dum la somero li ornamis la internajn murojn, kaj pentris kornojn super ĉiuj pordoj kaj fenestroj por malhelpi la eniron de iaj ajn specoj de koboldoj aŭ diabletoj</p>	<p>3 1906 Clarence Bicknell had the cottage built, Casa Fontanalba, on the land of Count Alberti della Briga, because he could not find a place to stay in the valley and so that he could continue his studies of the prehistoric carvings in the nearby Valley of Fontanalba and at the Laghi delle Meraviglie (Lacs des Merveilles). The cottage was finished in 1905, and in June 1906 he lived in it for the first time. During the summer he ornamented the inside walls, and painted horns over all the doors and windows to hinder the entry of any kinds of goblins or minor devils.</p>
<p>4 Photo file No. 1441 1906 Luigi Pollini de multaj jaroj estis kaj nun estas ankoraŭ mia ĉiohelpanto, sed precipe pri miaj botanikaj okupadoj. Li helpis min kolekti kreskaĵojn en Italujo, Francujo, Svisujo, Hispanujo, kaj ankaŭ en Korsiko, Siĉilio, Sardenjo, la Balearaj insuloj, Malto k.t.p. Ni kunvojaĝis al Alĝerio, Tuniso, Egiptujo, Sirio, Cejlono, k.t.p., kaj ĉeestis la Esperantistajn Kongresojn en 'Boulogne', 'Genève', 'Cambridge' kaj 'Barcelona'. Li eltrovis kaj tre bone fotografis multajn interesajn rokfigurojn, kaj li kulturas la legomojn k.t.p. en nia ĝardeno.</p>	<p>4 1906 Luigi Pollini was for many years and still is my factotum, but particularly for my botanical interests. He helped me collect plants in Italy, France, Switzerland, Spain, and also in Corsica, Sicily, Sardinia, the Balearic Islands, Malta, etc. We travelled together to Algeria, Tunis, Egypt, Syria, Ceylon, etc. and attended the Esperantist Congresses in Boulogne, Geneva, Cambridge and Barcelona. He discovered and expertly photographed many interesting rock figures, and he cultivates the vegetables etc. in our garden.</p>

<p>5 Photo file No. 1442 1906 Mercede Pollini naskiĝis en Isola Bella, Lago Maggiore, kaj edziniĝis kun Luigi Pollini en 1902. Ŝi estas tre bona Esperantistino kaj fervora propagandantino de la internacia lingvo. 1915 Joseph Benbow Ĉefĝardenisto de la fame konata botanika ĝardenode La Mortola</p>	<p>5 1906 Mercede Pollini was born in Isola Bella, Lago Maggiore, and married Luigi Pollini in 1902. She is a very good Esperantist and a fervent propagandist of the international language. 1915 Joseph Benbow, Head Gardener of the well-known botanical garden of La Mortola</p>
<p>6 Photo file No. 1443 1905 Edward Elhanan Berry, mia nevo naskita en Kanado, studis ĥemion en Londono, sed pro malsano deviĝis forlasi sian profesion kaj laborejon, kaj venis Italujon kie li fariĝis bankisto kaj agento por Anglaj fremduloj. Li poste estis Brita Vickonsulo. En 1908 li edziĝis kun Margaret Serocold.</p>	<p>6 1905 Edward Elhanan Berry, my nephew born in Canada, studied chemistry in London, but because of illness was obliged to leave his profession and place of work, and came to Italy where he became a banker and agent for English expatriates. He was later British Vice-Consul. In 1908 he married Margaret Serocold.</p>
<p>7 Photo file No. 1444 1906 Margaret Berry, mia bonevino, tre lerte elverkis la planon por sia bela domo en Bordighera, nomita Monte Verde kaj sur la krutaj kaj ŝtonaj deklivoj de la monteto faris mirindan ĝardenon florplena la tutan jaron. 1915 Jane Caroline Benbow edzino de Joseph Benbow</p>	<p>7 1906 Margaret Berry, my niece by marriage, cleverly designed the plan for her lovely house in Bordighera, called Monte Verde and on the uneven and stony slopes of the hill created an amazing garden full of flowers throughout the year. 1915 Jane Caroline Benbow wife of Joseph Benbow</p>
<p>8 Photo file No. 1445 1906 Robber (ŝtelisto) la nigra hundeto de mia nevino estis tiel nomita, ĉar kiam li estis juna, li tre ofte ŝtelis, sed nun li estas dekjaraĝa kaj tute konvertita al la vojo de honesteco. Li valsas bonege kaj laŭordine ternas.</p>	<p>8 1906 Robber, my niece's little black dog, was so called because when he was young he often stole things, but now he is ten years old and completely converted to the path of honesty. He waltzes very well and, upon command, sneezes.</p>
<p>9 Photo file No. 1446 1906 James Berry, mia nevo, fratulo de la Ruĝa Kolegio de Ĥirurgoj, kaj unu el la plej eminentaj ĥirurgoj en Britujo. 1915 Jules van Biesbroeck. Belga skulptisto kaj pentristo. Li lasis sian domon apud Gand kelkajn tagojn antaŭ la alveno de la germanaj sovaĝuloj. Tridek soldatoj ne volis atendi la ŝlosilojn kiujn la domgardanto...</p>	<p>9 1906 James Berry, my nephew, fellow of the Royal College of Surgeons, and one of the most eminent surgeons in Britain. 1915 Jules van Beisbroeck. Belgian sculptor and painter. He left his house near Ghent a few days before the arrival of the German savages. Thirty soldiers did not wish to await the keys that the housekeeper... [see next page]</p>
<p>10 Photo file No. 1447 1906 F. May Dickinson Berry, mia bonevino, kuracistino, M.D. 1915 ...promesis porti al ili, kaj rompis la pordon, la ŝrankojn k.t.p. kaj detruis kaj rabis 1915 Ninian R. Bell, estro de la 'Brita Magazeno' en Bordighera. Li estas Skoto de Edinburgh.</p>	<p>10 1906 F. May Dickinson Berry, my niece by marriage, physician, M.D. 1915 ...promised to bring to them, and smashed the door, the cupboards, etc. and wrecked and robbed 1915 Ninian R. Bell, head of the 'British Store' in Bordighera. He is a Scot from Edinburgh.</p>

<p>11 Photo file No. 1448 1906 Loftus T. Lucas estis maristo dum dudek jaroj, dum dek ses jaroj en Nordatlant Ko. kaj ŝipestro de granda vaporŝipo vojaĝanta inter Londono kaj Nov-Jork dum ok jaroj. Poste li lasis la marservadon kaj loĝis kun sia familio en Bordighera. 1915 Elizabeth F. Bell, edzino de S.ro Bell Thomas W. Bell, ŝia okmonataĝa filo</p>	<p>11 1906 Loftus T. Lucas was a sailor for twenty years, for sixteen years in the North Atlantic and captain of a big steamship travelling between London and New York for eight years. Afterwards he left the merchant marine and lived with his family in Bordighera. (Loftus T. Lucas was the captain of the 'Menominee', a transatlantic liner owned by Atlantic Transport Line.) 1915 Elizabeth F. Bell, wife of Mr Bell Thomas W. Bell, her eight-month-old son</p>
<p>12 Photo file No. 1449 1906 Ampeglio Biancheri estis mia ĝardenisto ĉe la Muzeo, Bordighera: li pasigis kvar jarojn en la marista servado kaj tiam revenis al mi. Poste li edziĝis kun lavistino, kaj estas nun florkulturisto. 1915 Attilio Clavenna, industriisto en Sampierdarena, kaj lerta Esperantisto.</p>	<p>12 1906 Ampeglio Biancheri was my gardener at the Museum, Bordighera: he spent four years in the merchant marine and then came back to me. Afterwards he married a laundrywoman, and now is a flower-grower. 1915 Attilio Clavenna, industrialist in Sampierdarena, and a skilled Esperantist.</p>
<p>13 Photo file No. 1451 1906 Arthur Berry, mia nevo. Li estas fratulo de la Kolegio de la Reĝo kaj matematika profesoro en la Universitato de Cambridge, Anglujo. Li verkis tre lertan libron pri la historio de astronomio. 1915 Michele Arabeno de Genova Esperantisto. Ni nomas lin nia bonanĝelo, ĉar kiam ni estis en...</p>	<p>13 1906 Arthur Berry, my nephew. He is a fellow of King's College and mathematics professor in the University of Cambridge, England. He has written a very clever book on the history of astronomy. 1915 Michele Arabeno of Genova Esperantist. We call him our good angel, because when we were in... [see next page]</p>
<p>14 Photo file No. 1452 1906 Hatty M. Berry, edzino di [tiel] Arthur Berry. Ŝi starigis lernejon en Cambridge, kaj instruas ĝeinfanojn. 1915 ...Paris la lastan jaron ĉe la komenco de la milito, kaj pasigis dekunu horojn en la Rue Blanche, por atingi la policejon kaj akiri la permeson por loĝado aŭ foriro, li ekvidis nin kaj tre ĝentile alportis bananojn kaj vinon kiuj freŝigis nin dum la terura baraktado en la popolamaso.</p>	<p>14 1906 Hatty M. Berry, wife of Arthur Berry. She established a school in Cambridge, and teaches children. 1915 [Michele Arabeno continued] ...Paris last year at the beginning of the war, and spent eleven hours in Rue Blanche, in order to reach the police station and obtain permission either to stay or to leave, he caught sight of us and very kindly brought bananas and wine, which refreshed us in the terrible struggle in the mass of people.</p>
<p>15 Photo file No. 1453 1906 Giacomo Pollini, mia bona kaj fidela servisto dum pli ol tridek jaroj. Li estas fama kuiristo, lerta fiŝkaptisto, kaj havas okulojn tiel akrajn, ke li povas ekvidi fungon sur la kontraŭa flanko de la valo. 1915. Robert Cuming ekskolonelo de la Reĝaj Irlandaj Fuzilieroj, posedanto de domo en Bordighera.</p>	<p>15 1906 Giacomo Pollini, my good and faithful servant during more than thirty years. He is a famous cook, a clever angler, and has eyes so sharp that he can spot a mushroom on the other side of the valley. 1915. Robert Cuming ex-colonel in the Royal Irish Fusiliers, owner of a house in Bordighera.</p>

<p>16 Photo file No. 1454 1906 Amalia Pollini, la plej juna filino de G. Pollini. Dum ŝia vizito tie-ĉi, ŝi tre fidele obeis la 'Regulojn' pro [sic] vizitantoj, el kiuj unu estas ke ĉiu kiu promenadas en la kamparon reportu hejmen se eble ion por la bono de la domo, ĉu lignon, ĉu sovaĝajn legomojn, ĉu fungojn, ĉu florojn, kaj ŝi ofte revenis tirante pezajn arbobranĉojn.</p>	<p>16 1906 Amalia Pollini, the youngest daughter of G. Pollini. During her visit here, she very faithfully obeyed the 'Rules' for visitors, one of which is that everyone who goes for a walk in the country has to bring home if possible something for the benefit of the house, either wood or wild vegetables, or mushrooms, or flowers, and she often came back pulling heavy tree branches.</p>
<p>17 Photo file No. 1455 1906 Maddalena Amoretti de Bordighera, dum multaj jaroj mia bona kuiristino 1915 Ruth M. Cuming, dua edzino de Kolonelo Cuming. Antaŭe ŝi estis flegistino en la Metropola Hospitalo. Londono</p>	<p>17 1906 Maddalena Amoretti of Bordighera, for many years our good cook 1915 Ruth M. Cuming, second wife of Colonel Cuming. Earlier she was a nurse in the Metropolitan Hospital, London</p>
<p>18 Photo file No. 1456 1906 Annette V. Lucas edzino de L. Lucas 1915 Achille Tellini Doktoro de Natur-sciencoj. Unue li estis helpanto de la Geologia Profesoro en Roma. Poste profesoro de geologio, botaniko, k.t.p. en la Licea Lernejo de Udine. Poste li fariĝis entuziasma Esperantisto, fondis la 'Cattedra Italiana di Esperanto', kaj multe verkis, vojaĝis kaj klopodis por disvastigi la internacian Lingvon.</p>	<p>18 1906 Annette V. Lucas wife of L. Lucas 1915 Achille Tellini Doctor of Natural Sciences. Initially he was assistant to the Geology Professor in Rome. Later professor of geology, botany, etc., in the Udine Upper School. Afterwards, he became an enthusiastic Esperantist, founded the 'Italian Chair of Esperanto', and abundantly wrote, travelled and worked to disseminate the international Language.</p>
<p>19 Photo file No. 1457 1906 Walter Mey, de Berlin. Pri tiu-ĉi sinjoro mi nur scias ke li alvenis vespere, malfrue, kun letero de amikino en S. Dalmazzo kiu petis ke mi trovu por li loĝejon en V. Casterino. Kompreneble loĝejo ne estis; do li vespermanĝis, dormis, matenmanĝis ĉe ni, kaj tiam malaperis, lasinte sian aŭtoĝrafon en mia vizitlibro.</p>	<p>19 1906 Walter Mey, of Berlin. About this gentleman I only know that he arrived late in the evening, with a letter from a friend in S. Dalmazzo who asked that I find him accommodation in V. Casterino. Of course a place to stay didn't exist; so he dined, slept, breakfasted with us, and then disappeared, leaving his autograph in my book of visitors.</p>
<p>20 Photo file No. 1458 1906 Arthur B. Crowther naskita en Tasmanio, venis Londonon por studien la hospitalo de S. Tomaso, kaj poste reiris hejmen por praktiki, kiel kuracisto en Hobart. Li iris al la Suda Afrika militado, kie li grave malsanis. En la jaro 1906 li renkontis min en Ĝenevo ĉe la Esperantista Kongreso kaj revenis kun mi al Val Casterino. Li havas eksterordinaran muziktalenton kaj ludas mirinde la fortepianon.</p>	<p>20 1906 Arthur B. Crowther born in Tasmania, came to London to study at St. Thomas's Hospital, and then went home to practise as a doctor in Hobart. He went off to the South African war, where he became seriously ill. In the year 1906 he met me in Geneva at the Esperantist Congress and came back with me to Val Casterino. He has an extraordinary musical talent and plays wonderfully on the piano.</p>

<p>21 Photo file No. 1458a 1906 Philip F. Dickinson pasigis kelkajn jarojn en Siĉilio, kulturante florojn. Poste li aĉetis bienon apud Ospidaletti sur la Liguria marbordo, kie li nun kulturas la plej belajn specojn de diantoj, rozoj kaj aliaj floroj.</p> <p>1916 Arthur Edward Turton, Brita Vickonsulo en Bordighera de la jaro 1911.</p>	<p>21 1906 Philip F. Dickinson passed several years in Sicily cultivating flowers. Afterwards he bought an estate near Ospidaletti on the Ligurian coast, where he now cultivates the most beautiful species of pinks, roses and other flowers.</p> <p>1916 Arthur Edward Turton, British Vice Consul in Bordighera as of the year 1911.</p>
<p>22 Photo file No. 1459 1906 Fritz Mader, filo de la pastro de la Gemana preĝejo en Nice, doktoro je filozofio. De longa tempo li estas esplorinta la glaciejojn, la geologian strukturon kaj floraron k.t.p. de la Maralpoj, pri kiuj li verkis tre lertan guidlibrojn. Li multe laboris por la firmo Baedeker .</p>	<p>22 1906 Fritz Mader, son of the pastor of the German church in Nice, doctor of philosophy. For a long time he has been exploring the glaciers, the geological structure and flora, etc. of the Maritime Alps, about which he has written a very clever guidebooks. He did a lot of work for the Baedeker firm.</p>
<p>23 Photo file No. 1459° 1906 C. Werner, amiko de D^{ro} Mader, kiu venis kun li ĉe ni</p> <p>1916 Doktoro Renato Pampanini, Profesoro de la botanika science en Firenze. Li akompanis la italan senditaron al Tripoli en 1913. Li nun okupas sin pri la florado de la respubliko de San Marino</p>	<p>23 1906 C. Werner, friend of Dr Mader, who came with him to visit us</p> <p>1916 Doctor Renato Pampanini, Professor of botanical science in Firenze. He accompanied the Italian expeditionary force to Tripoli in 1913. He is now occupying himself with the flora of the republic of San Marino</p>
<p>24 Photo file No. 1460 1906 Percy D. Leake, rajtigita kalkulisto en Londono. Mi konatiĝis kun Gesinjoroj Leake sur la Pasejo de Monto Moro inter Saas kaj Macugnaga kaj poste ni amikiĝis. Ili vizitis min en Bordighera Kristnaskon 1906 kaj ni supreniris al Val Casterino kaj pasigis tri tagojn en la neĝo.</p> <p>1916 Antonio Capponi de San Remo arĥitekturo, Sekretario de la komisiitaro por la konservado de antikvaj monumentoj de la Provinco de Porto Maurizio, kaj lerta abelisto.</p>	<p>24 1906 Percy D. Leake, chartered accountant in London. I got to know Mr and Mrs Leake on the Pass of Monte Moro between Saas and Macugnaga and later we became friends. They visited me in Bordighera at Christmas 1906 and we went up to Val Casterino and passed three days in the snow.</p> <p>1916 Antonio Capponi of San Remo architect, Secretary of the commission for the preservation of ancient monuments of the Province of Porto Maurizio, and a skilled beekeeper.</p>
<p>25 Photo file No. 1461 1906 Désirée Mary Leake, edzino de P.D. Leake</p> <p>1916 Joseph H. Barker antaŭe drapfabrikisto en Leeds, kaj nun tre konita aŭtoritato pri la teksartoj. Li de multaj jaroj verkas artikolojn por la grava Amerika gazeto 'The Textile American'.</p>	<p>25 1906 Désirée Mary Leake, wife of P.D. Leake</p> <p>1916 Joseph H. Barker formerly a cloth manufacturer in Leeds, and now a well-known authority on the textile arts. For many years he has been writing articles for the important American magazine 'The Textile American'.</p>

<p>26 Photo file No. 1462 1907 Giulio Hamilton filo de Irlanda patro kaj Franca patrino. Li studis en Firenze kaj fine en Dublin, kaj estas nun tre ŝatata kuracisto en Bordighera. 1916 Eric C. Woodhouse la plej maljuna filo de la estro de la Elektra Kompanio en Bordighera. Li estas kadeto de la Korpuso por la Edukado de Oficiroj (O.T.C.) de la Londona Universitato.</p>	<p>26 1907 Giulio Hamilton son of an Irish father and French mother. He studied in Firenze and finally in Dublin, and is now a much-loved physician in Bordighera. 1916 Eric C. Woodhouse the eldest son of the head of the Electric Company in Bordighera. He is a cadet in the Officers' Training Corps (O.T.C.) of London University.</p>
<p>27 Photo file No. 1463 1907 Nora Bicknell, mia nevino, mastrino de la pudelo Capi. 1916 Arthur H. Woodhouse kiu akompanis sian fraton. Ili ambaŭ venis por konduki hejmen hundegon Mirko, de S. Bernardo raso, kiu pasigis la someron ĉe ni.</p>	<p>27 1907 Nora Bicknell, my niece, mistress of Capi, the poodle. 1916 Arthur H. Woodhouse who accompanied his brother. They both came to take home the big dog Mirko, a St. Bernard, who spent the summer with us.</p>
<p>28 Photo file No. 1464 1907 Harold Stuart Thompson, angla botanikisto, kiu estis loĝanta en la hotelo S. Dalmazzo kaj suprenvenis tien-ĉi por konatiĝi kun nia monta floraro. 1917 Srino Rhea Bottacca Sanseverino kiu loĝas en Bordighera, ĝentile venis de S. Dalmazzo viziti min, kaj supreniris la valon 'Fontanalba' por vidi la rokgravuraĵojn</p>	<p>28 1907 Harold Stuart Thompson, English botanist, who was staying in the Hotel S. Dalmazzo and came up here to get to know our mountain flora. 1917 Mrs Rhea Bottacca Sanseverino, who lives in Bordighera, kindly came from S. Dalmazzo to visit me, and went up to the 'Val Fontanalba' to see the rock carvings</p>
<p>29 Photo file No. 1465 1907 Clarenza Pollini, fratino de Luigi Pollini. 1917 Fraŭlino Rita Bottazzo, filino de Srino Bottazzo. Dum longa tempo, ŝi estis tre sindonema flegistino en hospitalo por vunditajsoldatoj en Cremona.</p>	<p>29 1907 Clarenza Pollini, sister of Luigi Pollini. 1917 Miss Rita Bottazzo, daughter of Mrs Bottazzo. For a long time she was a very devoted nurse in a hospital for wounded soldiers in Cremona.</p>
<p>30 Photo file No. 1466 1907 S.E. Forbes, elektra inĝeniero en Bordighera; entuziasma montgrimpanto. 1917 Grafo / Leŭt. Generalo Alfonso Petitti di Roveto alvenis de lia domo en Cherasco (Cuneo) por viziti la gravuritajn rokojn</p>	<p>30 1907 S.E. Forbes, electrical engineer in Bordighera; an enthusiastic mountain-climber. 1917 Count / Lt. General Alfonso Petitti di Roveto arrived from his house in Cherasco (Cuneo) to visit the engraved rocks</p>
<p>31 Photo file No. 1467 1907 Guido Alberti della Briga, filo de Grafo Alberti. 1917 Kavaliro Francesco Casanova amiko de Grafo Petitti de Roveto estro de bone konita ibrovendejo en Torino.</p>	<p>31 1907 Guido Alberti della Briga, son of Count Alberti. 1917 Cavaliere Francesco Casanova friend of Count Petitti of Roveto head of the well-known bookshop in Torino.</p>

<p>32 Photo file No. 1468 1907 A. d'Adhemar de Lantagnac, bofilo de Grafo Alberti della Briga. Li estas kuracisto en Menton, kaj tre amata pro sia bonkoreco. 1918 Pauline Suzanne Stock venis kun sia edzo de S. Dalmazzo por viziti miajn prahistoriajn amikojn en Val Fontanalba.</p>	<p>32 1907 A. d'Adhemar de Lantagnac, son-in-law of Count Alberti della Briga. He is a physician in Menton, and much loved for his kindness. 1918 Pauline Suzanne Stock came with her husband from S. Dalmazzo to visit my prehistoric friends in Val Fontanalba.</p>
<p>33 Photo file No. 1469 1907 Federico Belgrano, amiko de la 2 laste nomitaj sinjoroj, kiujn li akompanis tien-ĉi. 1918 George Frederick Stock Fratulo de la Reĝa Geografia Societo. Li multe vojaĝis en Hindujo, Ĥinujo kaj aliaj orientaj landoj, kaj ankaŭ en Eŭropo kaj Ameriko</p>	<p>33 1907 Federico Belgrano, friend of the 2 last-mentioned gentlemen, whom he accompanied here. 1918 George Frederick Stock, Fellow of the Royal Geographical Society. He has travelled widely in India and other eastern countries, and also in Europe and America</p>
<p>34 Photo file No. 1470 1907 Caterina Aprosio, servistino de mia nevino Srino Berry 17.VII.1918 A. Gigo. Bovinisto, Alvenis el Saluzzo je la 23 horo, estis tro malfrue po [sic] iri ĉe sia bovinejo (post Pian Tendasco), mi oferis al li supon kaj logejon [sic], li reforiris matene de la 18a. Ankaŭ li vizitis kaj adiaŭdis [sic] nian karan mastron.</p>	<p>34 1907 Caterina Aprosio, servant of my niece Mrs Berry 17.VII.1918 <i>[in a hand other than Clarence's]</i> A. Gigo. Cowherd, arrived from Saluzzo at 11 p.m., was too late to go to his cow barn (on the other side of Pian Tendasco), I offered him soup and a place to stay, he set off again in the morning of the 18th. Also he visited and said goodbye to our dear master.</p>
<p>35 Photo file No. 1471 1907 Leo, la flava bruna hundeto de mia nevino Srino Berry, kaj amiko de C. Aprosio. 1918 Maria Giordano. Bovistino en la Valo Kasterino kaj lit-amikino de Mercede dum la forestado de Luigi.</p>	<p>35 1907 Leo, the little yellow and brown dog of my niece Mrs Berry, and friend of C. Aprosio. 1918 <i>[in a hand other than Clarence's]</i> Maria Giordano. Cowherd in the Val Casterino and bedfellow of Mercede during the absence of Luigi.</p>
<p>36 Photo file No. 1472 1907 Emilia Capani, la ĉarma kaj tre bona nepino de Srino Pellegrino kiu ĉiujare vizitas siajn geavojn en Val Casterino, kaj venis dormi en nia dometo dum mi kaj Luigi Pollini estas for 1918 Lucia Giordano Lakt-portistino kaj Lit-Amikino de Mercede dum la Forestado de ŝia Fratino Maria.</p>	<p>36 1907 Emilia Capani, the charming and very good niece of Mrs Pellegrino who every year visits her grandparents in Val Casterino, and came and slept in our cottage while I and Luigi Pollini were away 1918 <i>[in a hand other than Clarence's]</i> Lucia Giordano, Milk-carrier and Bedfellow of Mercede during the absence of her Sister Maria.</p>
<p>37 Photo file No. 1473 1907 Rosa Metaxas, fratino de Doktoro Hamilton. Ŝi studis flegadarton en Londona hospitalo, kaj poste edziniĝis kun greka kuracisto Dro Metaxas kaj helpis lin en lia kliniko.</p>	<p>37 1907 Rosa Metaxas, sister of Doctor Hamilton. She studied nursing in a London hospital, and later married a Greek physician Dr Metaxas and helped him in his clinic.</p>

38 Photo file No. 1473a 1908 R.H.Cunnington, Kapitano de la milita inĝenieraro en Anglujo	38 1908 R.H.Cunnington, Captain of military engineering in England. (R H Cunnington was a Captain in the Corps of Royal Engineers.)
